

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 1/1988

januaro 1988

L. Křesinová

Nia Esperanta Memor-arbo Plantita

Jam multajn jarojn sopiris ĉiuj geanoj de la Praga Esperanto-Klubo enplanti memoran Esperantan arbon. Fine tiu ĉi deziro estis plenumita. La 16-an de novembro 1987 estis en parko de Naděžda Krupská, kontraŭ nia klubejo en Vršovice, Kodaňská-strato, enplantita memora tilio okaze de la Centjariĝo de Esperanto kaj 85-jariĝo de nia klubo. La tutan solenan enplanton aranĝis kaj garantiis nia ano ing. Ludvík Veselý.

Antaŭ la 15-a horo komencis kunveni en Kodaňská-strato niaj geklubanoj kaj je la 15-a horo ĉiuj foriris tra la parko de Naděžda Krupská al la loko de la plantigo. La juna, kiel pupeto svelta tilio jam staris preparita por enplantado. Ĉiujn partoprenantojn bonvenigis la kluba prezidantino Helena Štruncová, akcentis la signifon de tiu ĉi ago por la paco kaj amikeco inter ĉiuj homoj kaj nacioj, ĉar tio estas la ĉefa tendenco de la Esperanto-movado. Poste ni ĉirkaŭis la belulinon tilieton, el bendo eksonis la Esperanta himno, kiun kantis infana ĥoro. En multaj okuloj ekbrilis larmoj kaj multaj partoprenantoj volonte kaj estime ĵetis ŝovelkvanton da argilo al la preparita tilieto. Mi opinias, ke ĉiu el ni en sia animo estis deziranta al si, ke tiu ĉi arbo estu fortega kaj branĉoriĉa arbo same kiel nia Esperanta movado.

Poste ni foriris en la klubejon, kie okazis mallonga kultura programo kaj gastigado, kaj sekvis amika babilado inter la kunvenintaj anoj, ĉar alveturis ankaŭ gesamideanoj el aliaj urboj. La babilado daŭris preskaŭ ĝis vespero. La geklubanoj disiris kontente kaj la rememoro je la festo certe restos longe en ilia memoro.

Eli Urbanová

Mu ŝ e t o

Sur dorso kun orkestro
muŝeto post fenestro
ĉiam ankoraŭ zumas
senespere,
dum ekstere
tegmentojn sun' orumas.
Sur travidebla tundro
malgranda nigra punkto.
Subite sin ekmovas
labirinto – –
Perdiĝinto
vojon al suno trovas.

(El "Verso kaj larmo")

Atenton!

Atenton!

La 22-an de februaro 1988 okazos la Jarkunveno de nia Klubo. Venu ĉiuj en nian klubejon en la Kodaňskástrato! Via ĉeesto estas nepre necesa. Invitas la Komitato.

Eli Urbanová

Kiam vi larmojn verŝas
Al aktorino Eva Seemannová

Unue la impresoj de ege belaj kruroj.
Mi ĵurus, ke al ili
fiksiĝis la okuloj.
Detaloj: Harlinio.
Ŝanĝema bril' de broĉo.
Kaj tamen tre, tre baldaŭ
nenio – nur la voĉo.

Via ton' tragedia!
Iu poŝtukon serĉas.
Ĉar estas vi unika,
kiam vi larmojn verŝas...
Jes, Eva, al vi rozojn!
Bukedon grandan, sciu!
Kaj al la kor' vin premi
kaj danki por ni ĉiuj.
("Verso kaj larmo")

Sklerozo

Laŭ la vortaro de fremdaj vortoj sklerozo estas "malmoliĝo de histo aŭ organo". Ĝenerale oni opinias cerbon tiu organo. Teorie, nia cerbo enhavas tiom da memorĉeloj, ke oni dum la tuta vivo ne povas ilin eluzi. Praktiko, kiel kutime, diferencas: Jam ĉirkaŭ la duono de mezlonga vivodaŭro registras miaj cerbaj ĉeloj gravajn aferojn – ekzemple ke mi estas ironta en klaskunvenon – nur kondiĉe, ke aliaj gravaj informoj – ekz. kion mi aĉetu por vespermanĝo – estas nuligitaj. Fakuloj asertas, se ni multe klopodos, ke ni rememoros je nia restado en la utero de la panjo kiel embrioj. Ni sklerozuloj havas multe pli modestajn celojn. Memori almenaŭ lastan diurnon.

Esti sklerozita apartenas al nia atomepoko. Eble niaj memorĉeloj blindiĝas pro brilo de televidekranoj, eble ilin sufokas nitroĝeno el legomoj aŭ ili ŝimas per antibiotikoj; fakto estas, ke dum mia okdekjara patro klare memoras, kiel li ludis maldekstran halfon por S. K. Vršovice (Sporta Klubo Vršovice – kvartalo de Prago), mi, kvardekjara, nur malfacile rememoras pri la lasta libertempo, miaj studentoj ne memoras hieraŭan prelegon kaj mia dekokjara filo forgesas kion ajn: pluvombreton en vagonaro, ŝlosilon en seruro, slipetojn por ricevi tagmanĝojn en lernejo, en tirkesto.

Sklerozo de sciencaj laboristoj havas la plej grandan tradicion, Kiam la edzino de mia amiko, kemiisto Josefo K., vidis, ke la edzo, iranta al scienca simpozio, pinglofiksas al jakfaldajo vizitkarton kun sia nomo, ŝi tute deprimiĝis, estante konvinkita, ke la edzo ne plu kapablas memori eĉ sian propran nomon... Vane li klarigis al ŝi, ke li ekspozicias sian nomon sur jakfaldajo al ceteraj kolegoj, precipe eksterlandaj. "Mi petas vin", protestis la edzino logike; "kiun entute povus interesi, kiel vi nomiĝas?!". De tiu tempo, kiam Josefo K. iras aĉetadi, alpinglas lia edzino la liston de aĉetota varo sur jakfaldajon de lia jako.

Klasika batalrimedo kontraŭ sklerozo estis ĉiam duplikati la cerban noton per noto skriba, kiun – se ne pinglofiksita al jako – la respektiva sklerozulo ordinare vane serĉis. Sklerozulojn de la atomepoko alrapidis helpi elektroniko. La okazintaĵo de la matematikisto Karlo L. tion demonstras. La tutan jaron luktis Karlo L. kun sia mantelo, kiu kaŝludis kun li. Ĉiun tagmezon, post sia tagmanĝo en studenta manĝejo, malfeliĉe ĉirkaŭrigardis Karolo L. la ejon borderitan per centoj da demetitaj supraĵvestoj, vane rememorante en kiu loko estas enfosita la lia. Iam helpis nenio alia, ol resti ĉ. du horetajn, ĝis la manĝejo malpleniĝos. Elektroniko ĉion ŝanĝis. La digitala vekhorloĝeto,

enpoŝigita en mantelo kaj alĝustigita je la tempo kiam la tagmanĝo finiĝis, kondukadis Karlon L. per pepado, kvazaŭ lumturo ŝipon erarveturantan tra nebulo. Malfeliĉe, la daŭro de tagmanĝo estas neregula kaj la pepado funkcias nur 30 sekundojn. Karlo L. iam post tagmanĝo gapadis, alifoje eksaltadis de nemalplenigita telero kaj ĵetiĝadis laŭ la voĉo de sia elektronika ĉefo. La scienteknika revolucio fine inventis "EĤO-ĤAIN", "eĥopendaĵon", kiu reagis per pegado je ekfajfo de sia mastro. Do, nun Karlo L. bonhumore tagmanĝas, poste li paŝetas al manteloj, inter kiuj enfosita – nekonate kie – dormetas en poŝo de lia mantelo la menciita aparateto. Prove li fajfas tie ĉi tie, poste ĉe la dua vando – kaj subite aŭdiĝas sava pepado, kiu fine alkondukas lin senerare al la celo.

Por ni, sklerozuloj, gravas la demando: ĉu sklerozo estas avantaĝo aŭ malavantaĝo por profesia kariero? La respondo estas dialektika: Ambaŭ. Kiam Karlo L. estis fariĝonta docento, oni kompreneble pripensadis, ĉu docento povas iradi en studenta manĝejo kaj fajfi je manteloj. La plimulto de ĉeestantaj sklerozuloj hipokrite opiniis tiun ĉi eblon skandalo...

Tamen denove estis la sklerozo, kiu savis la matematikiston. Kiam li, antaŭ unu jaro, estis elektita (dum sia foresto) resondeculo pri ornamo de la domo, li elpendigis flagojn kaj surgluis kelkajn daŭre validajn devizojn sur fenestrojn de tolaĵlavejo, post kio li skleroze tuj forgesis sian funkcion. Permanente ornamita domo pli poste gajnis en longdaŭra konkurso "la plej bela domo de nia loĝkvartalo" kaj tiel la prijuĝo de la loĝloko kompensis neĝustan mantelan konduton de la estonta docento.

La plimulto de ni alvenas al la granda aro de sklerozuloj iom post iome, akompanate de banalaj aferoj de perditaj ŝlosiloj kaj ne-rekonataj konatoj. Fortaj unuopuloj transpaŝas la limon per unusola brila ago.

Kiam Ladislao M. tiun printempan tagon alveturis per preskaŭ nova aŭto, marko "Škoda 120L", en la laborejon, neniel li sentis, ke liaj cerboĉeloj formortas kvazaŭ surŝutetitaj per DDT, sentante nur, kiel alvenas printempo. Fine de la labor-tago estis la sento de printempo tiom forta, ke li decidis telefoni al sia amikino je 10 jaroj pli juna, kun kiu li estis en delikata rilato: En la telefono aŭdiĝis konata vîrina voĉo kaj Ladislao M, tenere elbuŝigis: "Mi sopiras post vi!" "Kio?" diris la ino, kvazaŭ ŝi malbone aŭdus. "Mi flugos al vi per flugiloj de amo!" proklamis Ladislao M. lirike kaj la ina voĉo diris senhezite: "Ladislao, ci estas ebria." Nur nun Ladislao M. ekkonis la voĉon de sia edzino kaj terurigite ekbalbutis: "Nu permesu... Ja estas printempo!" Lerte li interrompis la konekton kaj ekis sin insulti: "Mi idioto, kiel mi povis kenfuzi la du telefonnumerojn?! Milfoje mi diras al ŝi, ke ŝi prezentu sin per sia nomo!" li furiozis kontraŭ sia edzino, kiam li hastis preter sia aŭto al metroo. Antaŭ la hejmo li tiom trankviliĝis, ke li rimarkis, ke lia aŭto ne parkas sur kutima loko. "Kie estas la aŭto?" li demandas la edzinon tuj ĉe la sojlo kaj poste ili ambaŭ nur gapis malfeliĉe al la vaka loko antaŭ la domo. Do, Ladislao M. iris anonci la ŝtelon de la aŭto al polico, kie oni lin konsolis per certigo, ke lia amataĵo certe jam estas ie dismetita je malhaveblaj anstataŭaj pecoj... Kiam Ladislao M. foriris la duan tagon el laboro, kun granda miro li rimarkis parkantan aŭton, aspektantan identa kun tiu lia. Li elpoŝigis la ŝlosilojn kaj kun sento de proksimiĝantaj malagrablajoj li ekaŭtis hejmen. Gardo-starantaj policianoj haltigis lin tuj, komune ili poste solvadis malklaran problemon, ĉu li sian aŭton ŝtelis aŭ trovis...

Sed ne gravas, kiel finiĝos ilia solvo – ni sklerozuloj vokas impresite: "Ladislao – estu bonvena inter ni!" YAK

(El Mag.Dik. tradukis H.Štr.)

Vážený soudruzi. Je mi třináct let a jsem žačkou 8. ročníku základní školy ve Vidči. Píši Vám, neboť bych se chtěla naučit jazyk Esperanto. Podle mne by se děti celého světa měly učit kromě své mateřštiny jeden společný jazyk, aby si všichni lidé na naší planetě rozuměli. Turisté by se nemuseli při neznalosti řeči země, kde pobývají, dorozumívat posunky, gesty a citoslovci, děti celého světa by si mohly dopisovat a poznávat, jak žijí jejich kamarádi třeba i na jiných kontinentech. Proto Vás žádám o zaslání potřebných informací. Děkuje Ludmila Ondřejová.

Malvarma akvo.

Malvarma akvo estas plua tre efika rimedo por malstreĉado de la okuloj kaj de ĉirkaŭaj histoj. Ekzerci tiel: kliniĝu super la lavujo, subakvigu la manojn, prenu en la manplatojn akvon kaj plaŭdjetu energie la akvon en la fermitajn okulojn – ripetu 20-foje. Tio tre refreŝigas la okulojn. Rekomendinda maniero ĉiam, kiam vi sentas lacon en viaj okuloj; sed ĉiukaze la ekzercon faru minimumo 3-foje ĉiutage. Grave, ke la akvo estu malvarma, ne varmeta.

Legado

Pri la legado oni supozas, ke ĝi kaŭzas multajn okulstreĉojn, precipe legado sub malbona lumo... Sed estas fakto, ke legado estas unu el la plej bonaj vojoj por havi aktivajn kaj sanajn okulojn, do legado NENIAM kaŭzas malbonan vidkapablon. Ne gravas kiom ni legas, sed gravas, ke dum la legadotempo la okuloj estu malstreĉitaj.

Homoj kun normala vidkapablo povas legi en ia ajn lumo sendanĝere; sed tiuj, kiuj havas difektitan vidkapablon kaj tiuj, kiuj portas okulvitrojn, subigas la okulojn al aldona streĉo dum la legado. Malgraŭ tio unu el la plej bonaj vojoj al la reveno de normala vidkapablo estas, ke tiuj homoj ĉiutage sufiĉe multe legu (kompreneble sen okulvitroj). Se oni legas laŭ ĝusta maniero, oni povas atendi nur profiton. Se oni legas laŭ la kutima maniero, la vidkapablo malboniĝos poiome. Bonan legadon sen okulstreĉo faru tiel:

Por kelkaj minutoj kovru la okulojn per la manplatoj – tiel faru ilian malstreĉadon, poste prenu libron aŭ gazeton kaj komencu legi en la distanco, en kiu vi povas legi plej oportune. Ĉe miopuloj estu la distanco ĉirkaŭ 15 ĝis 30 centimetroj, ĉe homoj hipermetiopaj (malmiopaj) kaj presbiopaj (vetchozrací) ĉirkaŭ 60 aŭ pli da centimetroj. Ĉe iuj kazoj de ekstrema miopeco estas necese certain tempon legi per unu okulo, ĉar alie la legodistanco povus esti tiel mallonga, ke ne eblas legi per ambaŭ okuloj samtempe. Tiukaze estas pli bone unu okulon kovri kaj legi per la dua okulo, por eviti la "tordon de la okulorganoj". Kiam unu el la okuloj laciĝas, ni interŝanĝu la rolon de la okuloj.

Tiel legu unu paĝon aŭ duonpaĝon aŭ kelkajn liniojn aŭ nur kelkajn vortojn, kiel oportunas, ĝis kiam vi eksentas laciĝon de la okuloj. Tiam ĉesu, plene fermu la okulojn por 1 ĝis 2 sekundoj kaj komencu denove legi. Legante daŭrigu dum la tuta tempo palpebrumi, ĝis vi ekkonas, ke vi kapablas legi sen peno kaj sen streĉo.

Legado farata laŭ tiu ĉi maniero plibonigas la vidkapablon kaj donas al la okuloj la laboron, kiun ili bezonas – ja ilia funkcio estas la laboro rigardi – sed neniam ilin tro streĉu.

Ĉio dependas de individuaj cirkonstancoj, kiel longe vi eltenos legi. Sed vi baldaŭ konstatos, ke post relative tre mallonga tempo, ekzemple post 2 aŭ 3 horoj, vi faros tion jam senpene. Homoj, kiuj kapablas komence legi nur per unu okulo, ne devas senti fortimigon. La dua okulo ja povas dumtempe ripozi. Tiamaniere eblas daŭrigi sufiĉe longe. Post ia tempo oni trovos, ke la vidkapablo pliboniĝas, la fokusdistanco adaptiĝas, ĝis tni fine sukcesas uzi ambaŭ okulojn samtempe.

(Daŭrigota.)

Noto de la redaktoro: en la pasinta numero de nia Bulteno, sur la paĝo 4, en la 11-a linio aperis malagrabra eraro; ĝuste devas esti: "vi ilin iomete krucigas". La redaktoro petas pardonon de ĉiuj, kiuj povas lin pardoni.

Jaroslav Hašek

Aŭstriaĵ doganoficoj

Trafis min malfeliĉo, ke antaŭ Dresdeno, kiam mi ekskursis en la ĉirkaŭaĵo de Dresdeno, transveturis min rapidtrajno. Mi estis belege dispremita, ke daŭris unu jaron kaj duonon, ol oni min solide riparis en hospitalo. Mi fiksas al mi reveni el la ekskurso al Dresdeno reen en Pragon post kvar tagoj, sed ĝi daŭris pli ol dek ok monatojn.

Cetere ni ĉiuj estas en la manoj de Dio, sed mi estis krome ankaŭ en la manoj de kuracistoj.

Mi aspektis terure. Kio restis propra en mi, tion mi ĝis hodiaŭ ne scias. Mi scias nur tiom, ke dek ok kuracistoj kun 52 asistantoj min arte kunmetadis en tuton. Kaj kiel bele. Mi ricevis ateston, el kio mi estas denove kunmetita, por ke mi povu vivi kiel kriplulo, kaj tiu atesto konsistis el 14 paĝoj.

Parte restis al mi nur peco de cerbo, ia parto de stomako, eble 15 kg de mia propra karbo, duonlitro da mia propra sango, la cetero estis ĉio fremda, escepte de la koro, kaj eĉ tiu estis kunkudrita el la mia kaj bova. La medicina scienco atingis verajn triumfojn.

La supraĵo estis entute artefarita. Tio estis notita ankaŭ en la atesto. Ĝi estis belega kazo, kiel la medicino povas eminente, kiel el konstrupecetoj kunmeti kastelojn, fari el diversaj partoj novan homon.

Post kiam oni elhospitaligis min, mi iris viziti miajn enterigitajn restaĵojn en la centra tombejo en la fako de enterigitaj hompartoj el la hospitalo, kaj poste mi foriris al la stacidomo kaj veturis en Pragon kun konscio, ke la ekskurson en Dresdenon mi ĝuis eble plej multe el ĉiuj turistoj, kiuj iam vizitis tiun belan urbon.

En Dĉĉin ni estis submetitaj al dogankontrolo en la aŭstria doganejo. Post kiam ili elprenis niajn valizojn kaj manfosetis en ili momenton, rigardo de unu doganoficisto falis sur min. Mia aparta aspekto de homo arte kunmetita vekis en tiu oficisto laŭŝajne impreson, ke homo, kiu tiele rigardas, devas esti almenaŭ transportanto de sakarino. Mi aspektis kiel batregalita kontrabandisto.

"Montru jen vian kofron," ordonis al mi la oficisto, "kaj venu en la oficejon." En la oficejo oni malfermis la kofron, traserĉis kaj trovis nenion suspektan, kiam subite ili ekvidis inter paperoj en la kofro la ateston skribitan en la hospitalo de Dresdeno kaj subskribitan de 18 profesoroj kaj 52 asistantoj.

"Homo," ili diris al mi rigardante en la ateston, "venu supren al la estro, tiamaniere vi ne povas en Aŭstrion."

La doganejestro estas tre ordema, pri sia devo zorgema sinjoro. Rigardinte en la ateston li diris:

"Antaŭ ĉio, vi havas - kiel estas en la atesto - la malantaŭan parton de la kranio anstataŭigitan per arĝenta plato. La arĝento ne havas patricon kaj tial vi punpagos 12 kronojn, la arĝento pezas 120 gramojn, laŭ la tarifoj VI. kaj VIII. b) n-ro § 946 de la doganreguloj vi intence volis transigi senpatrican arĝenton, vi do pagos trioblan punon, tio estas trioble 12 kronojn, 36 kronojn."

Plue dogano de 120 g da arĝento literoj b) kaj f) g) el la jaro 1902 post la reguligo de la internacia kontrakto el unu gramo 10 heleroj, tio estas el 120 gramoj 12 kronoj, plue vi havas maldekstran femuroston anstataŭigitan per ĉevala ostoj. Tion ni opinios nedeklarita transporto de ostoj. Per tio vi, amiko, malutilas al la aŭstra komerco per bestaj ostoj.

Por kiu celo vi portas en vi fremdan ĉevalan ostojn? Por ke vi povu iri? Ni do skribos en la protokolon, ke ĉevalajn ostojn vi uzas por metiaj celoj. Nur bele konfesu la kulpon, kara sinjoro!

Metia celo estas ja tre bela afero, sed nun ĝi ne alportos profiton al vi, ĉar ni havas grandan doganon por nedeklaro de tia transporto de bestaj ostoj en Aŭstrion.

Vi pagos 24 kronojn.

Plue estas jen informo, ke viaj tri ripoj estis anstataŭigitaj per platenaj dratoj. Homo! Ĉu vi tratransportas en Aŭstrion platenon? Ĉu vi scias, kio atendas vin? Tricentobla punpago! Se la tri dratetoj havas pezon 20 g, la punpago faras 1605 kronojn. Tio estas de vi puninda facilanimeco.

Sed kion mi vidas?

Jen estas skribite, ke parto de viaj renoj, nome la maldekstra reno, estas anstataŭigita per porka reno.

Kara sinjoro! Eksporto de la porka brutaro el fremdlando en Aŭstrion estas malpermesita. Tiu ĉi malpermeso koncernas ankaŭ parton de porkoj, kaj tial se vi volas en Bohemion, la reno devas resti en Germanio."

Ĉar mi ne konsentis pri tio, mi estas jam dek jarojn en Saksio kaj atendas, kiam la agraluloj, ĉar mi mem estas agralulo, permesos importon de porkoj en Aŭstrion. Tiam mi revenos en la patruon.

(Tradukis J. Patera)

PROGRAMO DE KUNVENOJ DE LA KLUBO DE ESPERANTISTOJ EN PRAHA por januaro - marto 1988

4. 1.	Humuro en la Esperanta literaturo.	- Patera
11. 1.	Velingrad kaj la ĉirkaŭaĵo	- D-ro Horský
18. 1.	Baltaj respublikoj (diapozitivaj)	- Sperling
25. 1.	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	- Štruncová
11. 2.	Belaĵoj de Roterdamo kaj Amsterdamo.	- D-ro Horský
8. 2.	Jam kvindek jarojn mi ludas teatron	- Seemannová
15. 2.	Libera tribuno	
22. 2.	Jarkunveno de la klubo	
29. 2.	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	- Štruncová
7. 3.	Anglie (diapozitivaj)	- Vyhlas
14. 3.	Libera tribuno	
21. 3.	Varsovio hieraŭ kaj hodiaŭ (diapozitivaj)	- Patera
28. 3.	Trarigardo de la Esperanta gazetaro	- Štruncová

La kunvenoj de la klubo okazas ĉiulunde de la 18.30 h ĝis la 20.00 h en la Agit-centro en Kodaňská-strato en Vršovice.

Gravajn vivojubileojn festos jenaj membroj de nia klubo:

s-ano Jan B í l e k

s-ano Jaroslav Č í ž e k

s-aro MUDr. Raymund K a l e n d a

s-ano Václav L o r e n c

s-anino Marie R o s o l o v á

s-ano Tomáš P a v l í č e k

s-anino Jaroslava Š p e r l i n g o v á

s-anino Bdeřiška Ř e h á č k o v á

S i n c e r a j n g r a t u l o j n a l ĉ i u j !

La 11-a Ĝenerala Konferenco de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) okazos ekde la 29-a de aprilo 1988 ĝis la 1-a de majo 1988 en Budapeŝto. En la kadro de la konferenco okazas plenkunsido de la konferencoj interkona vespero, kultura programo, trarigardo de Budapeŝto, libroaĉetado, renkontiĝoj kun alilandaj esperantistoj ktp. Mia klubo partoprenos la konferencon per speciala aŭtobuso. Aliĝojn akceptas la komitato de la klubo.

RADIO VIENO elsendas en Esperanto ĉiudimanĉe de la 6.30 ĝis la 6.45 h sur mallongaj ondoj 49 kaj 19 metroj (6155 kaj 15410 kHz) kaj de la 10.30 ĝis la 10.45 h sur mallongaj ondoj 49 kaj 19 metroj (6000, 6155 kaj 15410 kHz) (ankaŭ sur 25 m – 11915 kHz). Krom komentarioj kaj leterkesto oni elsendas jenajn prelegojn: 10.1. Patro Walter Klag La Testamento (pri Beethoven-memorloko), 3-7.1. Walter Mudrak, Ilse Panaechell: Recenzoj, 24.1. Ilse Panaschell: La turisma celo Nassereith, 31.1. D-ro Karl Beckmann: Kahlenbergerdorf ĉe Vieno, 7.2. Walter Haberl: La moderna plago: AIDS, 14.2. Ilse Panaschell: De Kolbnitz en Supra Karintio al Reisseck-Monto, 21.1..Aktualaĵo, 28.2. Dir. Herbert Mayers "Raŭmismo", kio estas tio? 6.3. 29-a Forumo, 13.3. D-ro Karl Beckmann: La junaĝaj jaroj de la Dua Aŭstria Respubliko, 20.3. Walter Haberl: Ĉu estas postmorta vivo? 27.3. Ilse Panaschell: La ĉelima loko Nauders, Tirolo. Aŭskultu kaj skribu al Esperanto-redakcio de ORE, 1136 Wien, Rakousko.

Plave celá rodina. Do rámce oslav 100 let TJ Bohemians ĈKD Praha zapadla úspěšně XII. veteraniáda plaveckého oddílu TJ Bohemians, která se konala v sobotu 14. listopadu 1987 na plovárně v Riegrových sadech. V kategoriích po 5 letech plavali muži i ženy všechny styly. Propagačním zpestřením programu byla akce "Plave celá rodina" na 3x25 m a ve štafetách dvou generací; velmi dobře se v tomto závodě umístily rodiny Srbových, Benešových, Preislerových a Očenáškových. Nejstarším účastníkem plavecké veteraniády byl Doc. Mil. Hoch (nar. 1915), který v kategorii nad 70 let zaplavoval 100 m volný způsob ve výborném čase 1:41,5. V kategorii nad 65 let vyhrál s-ano Ing. Jaroslav Liška pět disciplín, a to 100 m volný způsob časem 1:35,3, 50 m znak za 52,4, 100 m prsa za 2:05,5, 50 m motýlek za 57,0 a 4x25 m polohový závod za 1:56,9. Vítězové jednotlivých disciplín obdrželi upomínkově předměty. XII. veteraniáda byla zakončena malou oslavou 100 let trvání TJ Bohemians ĈKD na Slovanském ostrově. Blahopřejeme.

BULTENO de Klubo de Esperantistoj en Praha, baza organizaĵo de ĈEA, p.k. 1069, 111 21 Praha 1. Redaktas: Kultura kemisiono ĉe la komitato de la Klubo.